6-a Jaro. N-o 280 APERAS SEMAJNE Leipzig, 13./2. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerĥner

PRI KAŬZECO

Jam de antikva tempo la Budhismo konceptis, ke en la universo regas la leĝo de kaŭzeco, t. e. la principo de *karma*. Nune ankaŭ ni sciencistoj kredas, ke ĉio sin trovas inter la ĉeneroj de kaŭzo kaj rezulto.

La "karma" ne science solvas la rilaton. Ĝisnuna scienco ankaŭ ne sufiĉe klarigas ĝin. Antaŭ kelkaj jaroj PAVLOV el Leningrad instruis al ni la fenomenon de kondiĉita re- flekso. Mi volas pli grandigi tiun ĉi ideon kaj klarigi ĉiun rilaton, kiun fiziko kaj ĥemio ne povas solvi.

Laŭ mia opinio, oni povas dividi kaŭzecon en du specojn: la leĝon de kaŭzeco konstanta kaj tiun de hazarda. La leĝo de kaŭzeco konstanta estas absoluta, ne ŝanĝebla, la sama kaŭzo venigas ĉiam la saman rezulton. Ekz. sub la aerpremo de 760 mm, la akvo boliĝas ĉe 100° C. kaj glaciiĝas ĉe 0° C. La fluidiĝa punkto de ĉiuj elementoj kaj ĥemiaj produktoj estas ankaŭ ĉiam speciala. La movado de planedoj, la interreakcio de ĥemiaĵoj, la kaŭza rilato de meteorologiaj fenomenoj ktp. ktp. estas konstantaj, matematike mezureblaj. Kontraŭe la leĝo de kaŭzeco hazarda estas ŝanĝebla laŭvole, ne matematike mezurebla. La sama kaŭzo venigas ne ĉiam la saman rezulton kaj la sama rezulto ne devenas de la sama kaŭzo. Ekz. vidante la saman floron, la unua ĝojus, la dua malĝojus kaj la tria koleriĝus. Unu timas serpenton, sed ne araneon, la dua araneon, sed ne serpenton, kaj la tria nek serpenton nek araneon, sed ranon. Tia kaŭzeco estas tute alia ol la konstanta. Ĝi estis iam kondiĉita kaj fiksita. Ni ĉiuj havas emocion, sed la kondiĉo de ĝia apero tute malsimilas laŭ persono.

La vorto estas ankaŭ la produkto de la hazarda kaŭzeco. Ekz. kiam ni vidas la paperon, ni ĉiam aŭdas la sonon de papero. La vidimpreso estas tute sama al ĉiuj landanoj, sed la aŭdimpresoj de la aĵo estas ne samaj laŭ rasoj, regnoj aŭ landoj. La interrilato inter vid- kaj aŭdimpresoj estas nur hazarda, sed delonge fiksita.

La penso estas aro da vortoj, kaj la aranĝmaniero de vortoj, t. e. la pensmaniero estas ankaŭ hazarde kondiĉita kaj fiksita. Unuvorte la intelekto estas rezulto de la hazarde kondiĉita kaŭzrilato ĉe la impresoj de niaj sentorganoj. Tial ni nur miras aŭ opinias stranga la okazintaĵon ne denaske alkutimigitan, dum ni opinias tute prava la fenomenon science ne klarigeblan, sed denaske alkutimigitan.

Do, oni devas esti sincera por krei novajn vortojn, kiuj ofte kondukas popolon al erarideo.

Nia personeco kaj karaktero estas plene fiksitaj de la funkcio de nelaŭvola nervsistemo, kiu emas reagi ĉiam kun tia sama tipo al iu speciala impreso aŭ koncepto, kia ĝi estis iam kondiĉita.

La vivaĵoj evoluadas tiel heredinte iom post iom la emon akiritan, kiun ĉiu raso konstatis taŭga por sia cirkonstanco dum la ĉeno de generacioj. La diverseco de maniero dependas de la instigo de cirkonstanco, klimato, kunvivaĵo ktp., precipe de la kaŭzeco konstanta. Sed la malsimileco de la instinkto laŭrasa dependas de la hazarda kaŭzeco. Iuj praavoj de hirundoj estis devigitaj transflugi oceanon, kaj la emo fariĝis instinkto. Ŝafoj, kiuj estis devigataj vivi en la herbejo, akiris apetiton je herboj. Kameloj, kiuj estis devigataj vivi en la dezerto seka, povas konservi akvon en siaj stomakoj. Tiele la instinkto apetito estis tute hazarde kondiĉita.

La seksa instinkto estas ankaŭ pli malpli hazarde kondiĉita. Iuj incitiĝas pro speciala odoro, aliaj pro la vido kaj la triaj pro aŭdo. Ni homoj povas kontroli la seksan instinkton per la intelekto aŭ rezono, al ni la instinkto ne estas la absoluta ordono; ĝi dependas de la kaŭzeco hazarda kaj fiksita.

Ni povas laŭvole ŝanĝi la rilaton, por ke ĝi plej bone adaptiĝu al la socia stato. Ĉio estas sub la regado de la leĝo de kaŭzecoj konstanta kaj hazarda. Ni devas juĝi, ĉu la aĵo antaŭ ni aperanta koncernas — al kiu el la du leĝoj, kaj sintenadi tiel, kiel la leĝo ordonas nin.

Edukado de infanoj, socia idefluo kaj moralo rilatas al hazarda kondiĉo aŭ cirkonstanco. Plibonigu la kondiĉon kiel eble plej, do la socio homara pli altiĝus.

Hazime Asada.

El "Revuo Kultura" (Tokio).

La civilizo ne estas multe progresinta, tiom longe, kiom la popoloj havos por sia servo malsamajn k malamikajn lingvojn, pro kiuj ili ne interkompreniĝas, ne intermiksiĝas, restas unu antaŭ la alia tiom fremdaj, kiom estas la ĉevalo k la hundo antaŭ la homo, tiom longe, kiom ne ekzistos, sur la surfaco de l' tero, unu sola lingvo.

Oktavo Mirbo (France: Octave Mirbeau).

KIO OKAZAS EN KUBO?

Hodiaŭ, la sendependeco de Kubo estas nur nominala, reale ĝi estas regata de Usono, ĉar Kubo estas bona fonto de krudmaterialo, eksport-merkato k profitiga loko por kapital-investo.

Dum la pasintaj 27 jaroj de la sendependeco de Kubo, la Usona financistaro ĉiam sukcesis trovi "obe-eman servanton" en la persono de la Kuba prezidanto por regi la insulon Kubo laŭ la intereso de Usono. Ĉiu prezidanto ĝisnuna de Kubo havis amikan interkonsenton kun tiu de Usono por forigi, subpremi ĉiun ribelan aperon de la granda amaso laborista en Kubo, por ke la kapitalistoj de Usono k Kubo senĝene povu ekspluatadi la Kuban proletaron.

El inter ĉiuj prezidantoj de Kubo, la lasta, Herardo Maĉado (Gerardo Machado) estas la plej konvena al la financestroj. Per sanga teroro li povis k povas plej bone asekuri la usonajn interesojn subpremante la Kuban proletaron. Li estis elektita en jaro 1924 por periodo ĝis 1928, k pro lia obeema servado al usona imperialismo oni reelektigis lin ĝis la jaro 1934. Dum la pasintaj 5 jaroj de sia regado li faris el Kubo terorlandon tute saman, kiaj estas Polio, Italio, Hungario k aliaj faŝistaj landoj. Li faris ĉion je la nomo de la popolo . . .

La historio de lia kvinjara prezidanteco estas senfina serio de krimoj, kiujn li faris en la intereso de sia klaso kontraŭ la laborista klaso. Ĉi sube ni komunikas parton de la krimoj, kiujn li faris dum sia tirana regado (ĉerpaĵon el verko de Kuba Komunista Partio).

1. Por esti kandidato al la prezidanteco li koruptis, subaĉetis la parlamenton. 2. Li estas false elektita, subtenite de Zajas, eksprezidanto, kiu vendis la prezidantecon al li. 3. Antaŭ sia instalo li deklaris en Vaŝingtono, ke li en Kubo subpremos ĉiun strikon dum 48 horoj. 4. Li ŝanĝis ĉiujn nefidindajn oficirojn de la armeo per siaj konfidencaj amikoj. 5. Per minacoj li devigis la parlamenton rezigni pri ĝia leĝdonrajto. 6. Li publike alvokis la faŝistajn oficirojn de la Kuba armeo por elpeli 2 parlamentanojn el la parlamentejo, kiuj kuraĝis kritiki lian ministron. 7. Li aĉetis burĝan gazetaron k silentigis la opozician gazetaron per teroro. Post 3-monata regado li igis mortigi direktoron de opozicia ĵurnalo. 8. Li konfiskis la laboristajn k kontraŭimperialistajn gazetojn. 9. Per sanga teroro li subpremis la pravajn postulojn de la laboristoj dum la granda fervojista striko (1926). Multe da laboristoj estas forpelitaj, aŭ malliberigitaj. 10. Li fermigis la kunvenejojn de la laboristaro k persekutadis la gvidantojn de la laboristaro. 11. Per falsaj atestantoj k dokumentoj li punigis per multjara enkarcerigo senkulpajn strikintojn. 12. Li igis mortigi la organizinton de la sukerindustriaj gelaboristoj, K-don Eŭrike Varona; gvidinton de fervojlaboristoj en Siego de Avila; K-don Tomas Grant; K-don Baldomero Duneningo, la kasiston de fervojista organizo; K-don Torres Lopez, fervojiston; K-don Jose Cuxart en la Cabana fortikaĵo, k ankaŭ K-don A. Lopez, la sekretarion de la Habana Societo Laborista. Krome li igis mortigi pli ol 100 terkulturistojn k por trompi la publikon li asertis, ke tiuj laboristoj memmortigis sin. 13. Sen ia jura rajto li forpelis pli ol 400 laboristojn el Kubo. 14. Li restarigis la mortpunon. 15. Li uzis k uzas la armeon por krimoj kontraŭ la laboristaro. 16. Li iris en Vaŝingtonon por senkulpigi sin pri la terora stato en Kubo, dirante, ke li mortigis nur komunistojn. 17. Por malaltigi la vivnivelon de la Kuba laboristaro, k por havi grandan rezervon da senlaboruloj, li akcelis la enmigradon de la proksimaj insuloj. 18. La Kuba popolo estas en granda mizero pro lia stulta k reakcia politiko pri dogano k sukerindustrio. 19. Li aranĝas grandajn paradojn elspezante grandajn sumojn el impostmono, kies ŝarĝon nur la laboristaro elportas. 20. Dum la pasinta Konferenco Panamerika li mortigis 2 komunistojn, K-dojn Bouzont k Valobo, kies korpojn li ĵetigis al la ŝarkoj en la Habana Golfeto. 21. Kvankam li jam milfoje promesis nuligi la "Eumienda Platt"-on (parto de Kuba konstitucio rajtiganta Usonon interveni en aferoj de Kubo), li tamen kontraŭ la volo de l' popolo defendas tiun k la imperialistan planon usonan. 22. Li kruelege igis mortigi veteranon de la liberbatalo, pretekstante, ke li komplotis kontraŭ li. 23. Li disigis la studentan organizon "Proroga de Roderes", k ties gvidantojn li eksigis el la uni-

KULTURTASKOJ

M. Krjukov

(1-a daŭrigo. Vidu n-on 279)

2. En lingvo

2. 1. Unuigi lingvojn de ĉiuj popoloj per esp-o kiel per helplingvo, kiu finfine pro siaj avantaĝoj (unueco, simpleco, facileco k riĉeco) iĝos sola mondlingvo. Por SAT-anoj esp-o estas ne helpa, sed natura lingvo, t. e. lingvo de venanta socialismo. Lingvo estas korpa mekanismo, sed ne sole ideologia sekvo de sociordo. La sekvo estas ne lingvo mem, sed nur sumo da komprenoj (ideoj), per kiu agas la mekanismo nomata lingvo. Lingvo estas unu el la plej gravaj laboriloj organmaniere (kiel manoj) ligita kun korpo de homo. Tial komunigo de la mekanismo estos same profitdona k necesa kiel komunigo de ĉiuj aliaj laboriloj. Tial komuna lingvo kiel ĉiuj aliaj komunigendaj iloj (maŝinoj, fabrikoj, fervojoj ktp.) kreiĝas ne post, sed antaŭ Revolucio k Socialismo. Taskoj de la lastaj estos nur leĝigi k plu perfektigi ĝin. T. n. "fremdaj" naciaj lingvoj pro ilia multeco k malfacileco feliĉe ne povas esti atingeblaj por mondproletaro. Lernigi kelkajn, "plej gravajn" lingvojn al mondproletaro estas vere burĝa utopio, ĉar krom tio, ke ĝi estas neefektivigebla, ĝi celas ne radikale forigi malbonon de multlingveco, sed nur cedeme malfortigi ĝin. Simpleco en lingvo (karaktera en esp-o) estas samnomo de perfekteco, ĉar ĝi faciligas kombinojn de paroleroj k per tio la penson mem. Tial kontraŭstaro al racia lingvo estas ege reakcia k senespera ago.

Lerno de fremdaj naciaj lingvoj por proletaro ne devas fariĝi memcelo. Ĝi estas bezonega, sed ne pli ol t. n. NEP (sovetia Nova Ekonomia Politiko).

2. 2. Akceli reformojn en naciaj lingvoj. La reformoj pli k pli demokratigas lingvojn k finfine celas interesojn de ĉiam pli vastaj amasoj da laboruloj. Tial ili neniam okazas ekster helpo de revolucio k postulas grandan socian kuraĝon de l' reformistoj. Socia perforto estis necesa por realigi lingvoreformojn de Ŭiklef en Anglio, de Luter, Hus, Petro la Granda, Puŝkin, Majakovskij. Eĉ duonsimpligitan novan rusan ortografion sukcesis dekreti nur Revolucio[1]. Same Revolucio enkondukis en 1922 novan bulgaran ortografion; sangon de Revolucio postulis enkonduko de nova unuigita parollingvo de ĉinoj *Bajĥua* ktp. Uzo de mallongitaj vortoj en ĉiutaga vivo estas signo de lingvoprogreso (Plenumkom anstataŭ Plenumkomitato, Profunio — profesia unio, NEP — nova ekonomia politiko k. s.).

2. 3. Ne malhelpi pluan evoluon de esperanto sur bazo de ĝia fundamento. Suspektindaj estas, kiuj multe babilas pri lingva *disciplino*, ĉar en iliaj manoj la disciplino ofte servas nur por malhelpi la evoluon.

Por esti ne sole tuteŭropa, sed vere tuthomara, esperanta vortaro povas en sia plua evoluo utiligi okazan koincidon inter eŭropaj k aziaj vortoj. Ekz. la ĉina vorto *suj* (akvo laŭ pejpina prononco) tre similas al la turka *su* disvastigita tra tuta Azio. La ĉina *go*

[1] La simpligo de ortografio ne estas afero de Akademioj, sed de sociistoj k inventistoj. Akademioj taŭgas nur por nerapide konstati faktojn.

versitato por 2—6 jaroj. 24. Li malpermesis la organizadon eĉ al liberalaj partioj (burĝaj), k per militistaro li disigis iliajn kunvenojn. 25. Arbitre li modifis la konstitucion certigante por si la prezidantecon je dek jaroj. 26. Ankaŭ eksterlande li igis mortigon al la kontraŭ li batalantaj K-doj. En Meksiko li igis insid-mortigi K-don Antonio J. Mella.

Tiu ĉi listo estas nur parto de liaj krimoj kontraŭ la liber-batalo de la Kuba laboristaro. Certe, en neniu reakcia lando estas pli granda teroro blanka, ol en la mizera Kubo. Maĉado estas inda kunulo en la societo de eŭropaj tiranoj: Musolini, Horti, Pilsudski, k. a. Pri la terora stato en Kubo Maĉado mem estas nur parte kulpa. Li estas la sangavida servisto, ekzekutisto de la financistaro usona. La usona kapitalo regas Kubon k por efike, profite ekspluati ĝin, la popolon, la tieajn fabrikojn usonajn, la Kuba laboristaro estas subpremata per malhomecaj, brutaj labor- k vivkondiĉoj. La Kuba proletaro estas ekspluatata duoble: de la usona k ankaŭ de l' Kuba burĝaro. Ili tre bone interkonsentas por sufoki la ribelemajn mizerulojn. La Kuba teroro, k la ĉi tieaj krimoj sangaj kontraŭ laboristoj okazas sub la protekto de l' usona imperialismo, kiu tuj sendas sian militŝiparon k armeon kontraŭ landeto, kie la loka burĝaro subite perdis la regadon super la proleta amaso k bezonas la helpon de la potenca Usono, por subpremi la malkontentan laboristaron.

SAT-ano 15 135 en Kubo.

(Nomo ne subskribita pro singardemo pro la terora stato en Kubo.)

(regno, ŝtato) koincidas kun la slava samsignifa *gosudarstvo* en mallongita formo *gos* (en la vortoj *gos-plan, goskursy* k. s.). Se la nunaj vortoj akvo k regno estus anstataŭitaj per la vortoj *su* k *go* — la "orientaj" popoloj estus en esperanto tre proksimigitaj al la "okcidentaj". Pri vojo de plua evoluo de esperanto vidu mian artikolon en *Sennac. Revuo,* jaro 1923.

2. 4. Ne malhelpi enkondukon de t. n. "fremdaj" vortoj en naciajn lingvojn (alkoholo, ĉokolado, galoŝo k. s.). La vortoj kvazaŭ internaciigas homlingvojn k tiel kutimigas la penson de l' monda proletaro al utilo k neeviteblo de radikala lingvoreformo per racia esperanto. Kraĉu sur viajn naciemajn lingvopurigistojn, eĉ kiam ili pravigas sin kredigante, ke ili nur penas fari nacian lingvon pli komprenebla al "simpla popolo". Ili estas lupoj en ŝafofeloj.

2. 3. Igi k iĝi nekutimaj uzi en naciaj lingvoj la vortojn, kiuj prezentas alinacianojn kiel aĉulojn (la franca *boŝ*, la rusa *ĵid*, la hebrea *hoj*, la ĉina *blanka diablaĉo*, la araba *gjaur* k. s.). (Daŭrigota.)

MIA TAGO

Mi loĝas en duon-stacieto 16-a, apud Misovaja (Sovetio). Kvar ferfadenojreloj dekstren k maldekstren forkuras, de ambaŭ flankoj kurbiĝas k malaperas post rokoj. Tri dometoj... En unu loĝas fervoja majstro, mi, ĉeflaboristo k estas kontoreto. En la aliaj du: laboristoj k fervoj-gardistoj. Apud la domoj komenciĝas arbaro,



kiu kovras montaron, rampante sur ĝiajn pintojn.

En la arbaro nun floras rododendroj (majo), sed baldaŭ estos diversaj beroj, fungoj k nuksoj. Dum fino de somero multe da homoj alventuros por kolekti naturajn riĉajojn. Dume okazas ĉasado k fiŝkaptado ĉe apudaj riveroj k Bajkalo. Ĉi tiu lago kuŝas flanke...

Matene k vespere mi kuras el mia ĉambro trans fervojlinion por min bani en malvarmaj ondoj de la lago. Leviĝinte je la 6-a horo, min baninte, manĝinte mi je la 7-a iras al laborkolektejo. Mi kontrolas ĉeeston de laboristoj k klarigas labortaskojn. Kelkajn laboristojn mi dissendas al diversaj lokoj k mem kun kerno iras por ripari fervojon.

Mi estas labortrupestro (22 j.) k mia devo estas observi, ke para 5-kilometra fervojo (sume 10 km.) estu ĝusta kiel laŭ plano, same laŭ profilo, ke estu nenia difekto, kiu kaŭzus vagonaran katastrofon.

Min helpas ĉeflaboristo. Dum nokto k tago en filio deĵoras gardistoj, kiuj trairante observas situacion de l' fervojo k raportas al mi; same mi mem ofte kun nivel-liniilo k larĝmodelo kontrolas horizontalon k larĝon. Nur se ie estas difekto, mi iras kun laboristoj por ĝin forigi. De 11-a ĝis 12-a estas tagmeza interrompo. Se ni laboras malproksime de hejmo, ni tagmanĝas sur herbo en arbetaro, se ne, do ni iras hejmen.

Ni finas la laboron je la 16-a, sabate je la 13-a. Por dimanĉo mi per boato sur Bajkalo forveturas al Misovaja, kie mi loĝis antaŭe k kie funkcias esperanta grupo. En Misovaja estas 5 SAT-anoj, kiuj dimanĉe kolektiĝas k kunsidas. Mi estas peranto por tiu ĉi grupo. Dum vintro mi loĝas en Misovaja k funkciigas esperantan movadon.

Vespere mi revenas al mia "ursa anguleto" k ĉe "sankta lago" inter rokoj k densa arbaro, denove plenumas miajn aferojn... Miraklas mondo... Granda mondo! Kaj estas ligitaj kun ĝi fadenoj per esperanto: jen sur tablo kuŝas leteroj el diversaj landoj, "Sennaciulo", "La Nova Epoko" ktp. Jam loĝantoj de duonstacieto proks. 25 personoj kolektiĝas en profesia aŭ komunista kunveno. Se ne, do mi dediĉas vesperojn al legado k skribado, post unuhora promenado.

Vesperoj... Dum suno postiras montojn, diverskolora la lago per "barguzin" (vento) alportas freŝan aeron. Tiom freŝan, eĉ malvarman!

Fervojan reton sen halto trakuras vagonaroj, nur por minuto alportante bruegon. Iu sur bordo altvoĉe kantas ĉi tie ŝatatan kanton: "Glora la maro, la sankta Bajkal'..." Suno postiris. En intermonto nebulas. Dum ĉio eksilentis, estas pli aŭdata brusono de Bajkalo. Ekmallumis!... Tago finiĝis! *V. Zimin (6184), 7-a horzono.*



En kunesto kun grandaj spiritoj

Ho! mi ne petas la junulojn veni al ni pro modo. Kiujn modo donis al ni, modo reprenis. Ĝi gardu ilin. Ili maljuniĝos kune kun ĝi. Sed mi demandas al ĉiuj, kiuj konsideras kiel gravan aferon la vivon — tiel mallongdaŭra eĉ por ili — kiu al ni ĉiuj estas oferita, mi demandas al ili: "kion vi faros kun viaj dudek jaroj? Kion vi faros kun viaj koroj? Kion vi faros kun viaj cerboj?" J. Ĵores (Jaurès).



Kiuj, depost jarcentoj, tre alte starigis sian idealon, ĉiam estis pravigitaj de l' historio. Kaj tiuj estos ankaŭ pravigitaj, kiuj ĝin starigos ankoraŭ pli alten. J. Ĵores.



Kuraĝo estas superregi niajn proprajn erarojn, suferi pro ili, sed ne subfleksiĝi kaj daŭrigi nian vojon. Kuraĝo estas ŝati la vivon kaj alrigardi la morton kun trankvila okulo; iri al idealo kaj kompreni realon; agi kaj sinoferi al la grandaj idealoj, nesciante kian rekompencon la profunda universo rezervas al nia peno, nek ĉu ĝi ian rekompencon rezervas. Kuraĝo estas serĉi la veron kaj ĝin eldiri, ne kliniĝi antaŭ la forto de l' nuna triumfanta mensogo, kaj ne eĥi per nia animo, nia buŝo kaj niaj manoj al la stultaj aplaŭdadoj kaj fanatikaj kriegoj. J. Ĵores.


Esperantigis A. Demidjuk (4540) kaj G. Salan (3905).

E. LANTI

La Laborista Esperantismo ★

Ĉio, kion laborista esperantisto devas scii pri estiĝo k kreskado de l' esp. movado en proletaj medioj, pri la kreiĝo, celoj, taskoj k evoluado de SAT, pri nia sinteno al aliaj esp. organizoj ktp., estas en konciza, klara formo, komprenebla por ĉiu, entenita en tiu ĉi broŝuro. 40 pĝ. — Prezo 0.40 mk. g.)

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.



N-o 20 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 16. Februaro 1930

EL HISPANIO

Striko de hispanaj studentoj

136 (Esperanto-Servo.) Inter la hispana registaro k la studentaro jam antaŭ du jaroj ekestiĝis malkonkordo. La registaro faras kion ĝi povas — se ne leĝe, almenaŭ per la influo de sia povo — por ne ebligi la starigadon de la liberulaj student-asocioj. Ĝi male faras ĉion eblan por starigi katolik-karakterajn organizojn. La pleja aŭtoritatulo de la liberpensaj student-oj estas arestita k la registaro volas socie senrajtigi lin. Tial, ke nur ekzistas katolik-organizoj, nur ili povas reprezenti la hispanan studentaron ĉe internaciaj kongresoj. La cititaj k ankoraŭ aliaj kaŭzoj rompis la ŝajnan harmonion, k nuntempe revigliĝas la konflikto, kio jam nun karakteriziĝas pro la ĝenerala strikado de la studentoj. La unuan striktagon oni pendigis ruĝan standardon en la Centra Universitato k en la Medicina Akademio. *10 502.*

EL TURKIO

Unua striko de turkaj virinoj

137 (Esperanto-Servo.) Turkaj virinoj gvidis sian unuan strikon k plen-sukcesis. 2000 laboristinoj en segejo postulis saman salajron kiel viroj, ĉar ili devas plenumi ankaŭ la saman laboron. Ili demonstraciis en la stratoj en siaj laborvestoj, svingis la hakilojn super la kapoj k laŭte kriis siajn postulojn. Pro energia, konscia k sencedema sinteno de la virinoj la entreprenistoj malkuraĝiĝis k konsentis la postulojn. Do tiuj turkaj virinoj perbatalis por sama laboro saman salajron kiel viroj. Imitu . . .!
I. F.

EL ĈEĤOSLOVAKIO

Senlaboreco en la "Iser"-montaro

138 (Esperanto-Servo.) La mondfama vitraĵ-industrio de la regiono Gablonz a. N. jam depost monatoj troviĝas en danĝera krizo. Kaŭzo de tio estas, ke en diversaj landoj (Japanio, Usono k. a.) oni produktas mem la koncernajn artiklojn je pli malkara prezo. Due kulpas por tio la dogan-malfaciloj k la kreskanta krizo sur la mondmerkato entute. La ĉi-tiea luksaĵ-industrio donas normale laboron al pli ol 100 000 homoj. Antaŭ jaroj, kiam ĝi ankoraŭ disvastiĝis, en centoj da plejparte malgrandaj metiejoj la labortempo estis senlima, leĝan okhoron oni ignoris. Pro tio konstante kreskis la aro de la senlaboruloj, ankaŭ en aliaj industrioj, precipe en la teksaĵa. Samtempe kun la pliakriĝinta mizero de la laboristaro, kreskis la nombro de luksaj domoj k luks-aŭtomobiloj de la industriistoj k eksport-entreprenistoj. La situacio estas despli malagrabla, ĉar nur la plej malmultaj laboristoj estas sindikate organizitaj, la aliaj ne ricevas mon-subtenon laŭ la "genta sistemo". La komunumoj k distriktoj "ne kapablas doni iomete sufiĉan monhelpon". Pro interna disŝpartiĝo de la laboristaro, kontraŭstaroj k manifestacioj ne havas sukceson, naciisma edukado malhelpas interesigi ilin por ekonomiaj k politikaj celoj . . . *8889, Reinowitz.*

Faŝistoj restu inter si

139 (Esperanto-Servo.) En Hodonin estis anoncita por la 26. 1. publika faŝista kunveno, kie devis paroladi eksgeneralo Gajda, gvidanto de la ĉeĥoslovakia faŝistaro. Li vivis ankaŭ certan tempon en Italio. Jam kvarono antaŭ komenco la ĉambrego estis plenigita. Inter la partoprenintoj estis 90% komunistoj (en Hodonin havas la kompartio la plimulton). Komunistoj postulis, ke oni laŭleĝe elektu prezidantaron. La tuta faŝistaro, ĉ. 15 anoj, kontraŭstaris, kio kaŭzis grandan konflikton k finfine, post dekminuta disputado, la kunvenintoj disiĝis sen sang-verŝado. Poste la faŝistoj aranĝis kunvenon inter si.
13 475, Hodonin.

EL POLIO

Krizo — Perlaboroj — Senlaboreco

140 (Esperanto-Servo.) La direkcio de metal-fandejo en Paruszowiec (Paruŝoviec — Silezio) haltigis la laboron k maldungis kelkcentojn da laboristoj. Ankaŭ la metalfandejo Laŭro en Siemianovice reduktis duonon da laboristoj. En minejo Kleopas en Zaleĵ oni reduktis laboron ĝis 4 tagoj en semajno En la tuta industrio silezia en daŭro de semajno (12.—19. 1. 30). 2000 laboristoj perdis laboron. — Direktoro de buĉejo ricevas pomonate ĉ. 5000 zl. (1 dolaro = 8 zlotoj k 8 groŝoj), dume popol-instruisto perlaboras 200 zl., ministo iom pli ol 200 zl. (diferenco rimarkebla). — Laŭ lasta oficiala informo de la statistik-oficejo en Polio estas nun 106 348 senlaboruloj (k neoficiale?). *C. G., Lublin.*

EL GERMANIO

Ankaŭ "kvintaga" laborsemajno

141 (Esperanto-Servo.) La 27-an de januaro entreprenistoj en la saksaj minejoj enkondukis la "kvintagan" laborsemajnon, t. e. ke la ministoj devas festi du tagojn en la semajno, do ili laboras nur ankoraŭ kvin tagojn. Ilia vivstato, antaŭe jam sufiĉe mizera, fariĝis ankoraŭ pli terura. Malgraŭ surpapera 7-hora labortago oni antaŭe postulis de ili potagan laboron dum 8—10 horoj, k nun . . . ili subite devas resti hejme tutan tagon (krom dimanĉo). *8696, Hohendorf.*

Ĉu vi utiligas ĉi raportojn?

EL BULGARIO

La LLL-tago en Sofia

142 (Esperanto-Servo.) La tago de la tri grandaj gvidantoj de la tutmonda revolucia proletaro, Lenin-Libkneĥt-Luksemburg, estis festita en Sofia per disĵetado de multaj alvokoj, ĉefe nelegalaj de kompartio k komjunularo, per pendigo de ĉ. 20 ruĝaj nelegalaj standardoj en la diversaj urbpartoj, fine — per stratkunveno, spite malpermeso de la polico, vespere la 21. 1. Ĉi-okaze la polico arestis Gek-dojn per helpo de policaj hundoj. La kunveno estis sangigita: la poliĉo pafis al la Gek-doj, k unu K-do estis vundita. Sed spite ĉio la batalo daŭras k daŭros ĝis fina venko. *Gol, Sofia.*

EL AŬSTRIO

Teror-leĝo kontraŭ episkopa moŝto

143 (Esperanto-Servo.) Laŭ episkopa dekreto al la teologi-profesoro Johann Ude (katolika pastro en Graz) estas malpermesata predikado k publikaj prelegoj. Samtempe li ricevis ordonon, ĉiun artikolon antaŭ presigo antaŭmeti episkopan cenzuron. Johann Ude ne nur estas katolika pastro, sed li propagandas depost jaroj ŝanĝojn en reala krista senco. Li batalas kontraŭ alkoholo, kontraŭ diboĉaj amuzadoj nuntempaj. Sed antaŭ ĉio Ude ribelis kontraŭ katolika parti-politiko, kiu estas kapitalista k popol-malamika. Li skribis k predikis kontraŭ milito (nature ankaŭ kontraŭ civitana milito), kandidadis dum baloto kontraŭ la Seipel-partio ktp. Do jen la kaŭzoj por silentigo. Kompreneble la pastraro ne devas batali kontraŭ militoj, alkoholaĵoj; la last-cititajn ili ĉiutage dum di-servo trinkas kiel "sango de jesuo". *7658, St. Pölten*

RESPONDA PARTO

Listo de raportoj forrestos: 1. ĉar tiun lokon pli utile ni povos uzi; 2. ĉar *nur 1 K-do* raportis pri rezultoj de laboro en pasinta kvaronjaro!!

Gol. Cent levoj ricevitaj.

Aptekman. Via raporto sendita al red. de "S-ulo", ĉar priesp-a.

Al multaj. Viaj raportoj aperos laŭvice.

Korektoj. Raporto 123 enhavas kelkajn erarojn: 1. ne mankis skribmaŝino, sed „tape machine" (angle — ŝajne maŝino por akcepto de novaĵoj); 2. oni ne eldonis varb- sed *prov*-numeroj (por esplori, ĉu la ĵurnalo konvenas . . .).



Sub kontrolo de Junulara Sekcio de SAT. Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstrasse 14, Neckarsulm (Germ.)

KIAJ ILI ESTAS?

Mi celas la samseksamantojn. Kelkfoje mi aŭdis kiel knabo pri fakto, ke estas viroj nenormalaj laŭ sekskonsidero. Tio estis mia tuta scio ĉi-rilate, ĝis mi renkontis tiaulon. Estis en Amsterdam. Vagante tra Holando mi vespere nur alvenis en la urbon. Vane mi serĉis malmultekostan hotelon. Nun mi decidis iri al ĉefstacidomo k tie iom ripozi. Estis ankoraŭ vigla trafiko. Homoj rapidis al forveturontaj vagonaroj. Envenis roto da savarmeanoj k ili konsilis al mi, laŭ mia demando pri noktrestejo, iri al "Singel". Estis noktomezo, kiam mi fine trovis la savarmean domon en la havenkvartalo. La kelnero ne akceptis min. Ree mi paŝis lacege tra la misteraj stratetoj. Prostituinoj sin ekspozis je milda ruĝa lumo en elmontraj fenestroj. Reen al la stacidomo, k jen mi nur povis konstati, ke la stacidomo jam estas fermita. Oficisto kontrole iris tra la halego. Kion fari nun?

Transe estis tramatendejo. La atendantaj veturontoj eliris. Simple mi kuŝigis min sur la benkon uzante mian valizon kiel kapkusenon. Jam mi duondormis, jen envenis du oficistoj, kiuj al mi ordonis eliri. Antaŭ la vid-al-vida vitropavilonego staris viro. Li voketis, faris signojn per la brako, ke mi venu transen. Li klarigis al mi per vortoj, kiujn mi ne komprenis, k per gestoj, kiujn mi bonege komprenis, ke mi povas noktresti en la pavilono. Tie staris benko. Li alportis mantelon kiel remburaĵon k demandis min, ĉu mi eble deziras trinki tason da lakto. Dume li foriris. Kuŝante sur la benko mi atendis lin. Daŭris longe. Pasis kvin minutoj, dek minutoj, pli ol kvarona horo. Fine li revenis, donis al mi tason da lakto k poste foriris. Mi nur gustis ĝin, ĝi estis strangegusta k mi suspektema. Kiam li revenis, li miris, ke mi ne jam dormas k demandis pri la laktoglaso. Denove li foriris. Ial mi ne dormis spite ega laco. Pasis nur ioma tempo k li denove revenis. Li glitis al la benko k kontrolis, ĉu mi dormas. Tiam li tien k reen iris en la halo, tra kies vitraj muroj envenis ioma destrata lumo. Estis maltrankviliga situacio. Plej volonte mi estus forkurinta, sed la pordon li estis ŝlosinta. Unutona paŝklakado de la tien k reen iranta monstro. Ĉiuj nervoj estis streĉitaj. Kion volas li? "Mi devas havi klarecon", mi ekpensis k faris al li venigan geston. Kaj tiam mi klarigis al li, ke mi neniom havas krom mia mizera havaĵaĉo, ke mi monon ne havas; mi tion pruvis montrante la malplenan monujon. Ekrikanis li forirante. Li alportis al mi monon, eksidis ĉe miaj piedoj k karesis ilin, kvazaŭ li volus min trankviligi. Daŭra karesado. Palpado. Subite fulmsimile ekiĝis



en mi la penso: *Harman*[1], k kiam li palppremis mian abdomenon, tiam mi divenis lian intencon. Frostotremis mi. Interbatiĝon mi ege malŝatas. Sed kiel do mi povus elveni el tiu situacio? Mi petis lin pri kafo. Servute li obeis al ĉiuj miaj deziresprimoj. Panon, pinglon, fadenon, monerojn li alportis. Ĉiam ree mi petis pri iu objekto, nur por ke li foriru k ĝin serĉu. Fine mateniĝis. Je la kvara venos lia ĉefo, tiam li antaŭe devos min forpermesi . . .

Furioze pro nesukceso li akompanis min al la pordego. Li invitis min al tagmanĝo en hotelo. Ke mi lin tie atendu k ankaŭ sekvantan nokton revenu. Ĉion mi promesis, por ke li ne pli incitiĝu. Manpremo. Verdire mi manpremis tiun monstron. Kaj kiam mi poste lacege iris tra la stratoj k rigardis la nigran kanalakvon, tiam tiu nokto ŝajnis al mi instrua travivaĵo.

Pasis monatoj. Vagante mi venis tra Germanio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Aŭstrio. Ĉie mi renkontis tiaspecajn ulojn. Sennacia afero! Kaj tamen niaj edukistoj prisilentas fakton, prisilentas la trian sekson. Necesegas klarigo. Plej ofte knaboj estas la viktimoj. Per donacetoj, ĉokolado, bombonoj ktp. oni ilin allogas; senhejmajn junulojn ili atencas. Ili sukcesas, ĉar la junulo renkontas ion, kontraŭ kio li ne povas sin defendi, ĉar la afero estas plej ofte nekonata.

Ni ne povas forigi naturan inklinon ĉe tiuj bedaŭrindaj nenormaluloj, kiuj pro si mem pleje suferas. Sed ni devas konigi al la junuloj tute objektive la veran vizaĝon de l' vivo, tiam ni tre verŝajne kapablos evitigi ruinigajn spertojn. La tria sekso same havas sian rajton kiel ĉiuj aliaj seksoj, k kiam la publika opinio ilin konsideros samuloj, tiam ili eble ne plu estos danĝeraj por junuloj. La malestimego k punoj, per kiuj la socio rekontis al tiauloj, pelis multajn sur krimvojon. Trud-elpremo estas unu el la sekvoj. Eble la Scienc-Kultura Sekcio zorgos pri disertacio klariganta la temon.

A. S. (10 580).

[1] Hommortiga monstro, kiu vivis en Germanio k mortigis en seks-emocio siajn samseksajn viktimojn.

NIA EKSKURSO

La 28. 12. 29 okazis nia jam delonge planita ekskurso al la Naturamika domo en Grojĉ (Groitsch). Partoprenis 11 Gek-doj. Sabate posttagmeze ni forveturis ĝis Pegaŭ k de tie piediris ankoraŭ ¾-an horon al la naturamika domo. Alveninte ni pasigis tie la vesperon per kantado k amuzaj tabloludoj; ankaŭ manĝadon ni ne forgesis. Estis jam 22½ horo, kiam ni enlitiĝis, sed eble ankoraŭ dum horo okazis diskutado en la dormejoj pri diversaj interesaj temoj. Kiam ni vekiĝis la alian tagon, ni bedaŭrinde devis konstati, ke la vetero ne estas bela. La ĉielo estis griza k la vento blovis, krom tio ĉiuj vojoj estis marĉaj. Tamen ni promenis en la ĉirkaŭo de la naturamika domo k estis gajaj laŭ la kanto: ". . . malgraŭ vento k pluvado ĝoju ni, ĉar junaj ni." Ni trapasis belajn herbejojn k ludis tie. Ni deziris reveni tien dum somero, kiam ĉio estos verda. Sed ankaŭ nun tre plaĉis al ni tiu montareta pejzaĝo k posttagmeze ni denove travagis la ĉirkaŭon, ĉefe irante tra arbaro. Ni observis ofte la ĉielon, la nuboj estis tre interesaj k daŭre ŝanĝiĝis.

Reveninte en la hejmon ni kantis kune kun la aliaj gastoj k faris tabloludojn esperantlingve, kiujn ankaŭ partoprenis neesperantistoj; rapide ĉi lastaj encerbigis al si la necesajn esperantajn vortojn. Tro rapide pasis la tempo, k finfine ni ja devis adiaŭi, prokrastinte la foriron tiel longe kiel

NIA POŜTO

E. Kunze (13 285). Via: "Liberigu vin" aperos. Pri temoj: "Kian taskon devas plenumi la junularo" k kial "junular-movado" mankas artikoloj. Do bonv. verki. Tekston por parolhoro mi ne havas.

TRA ESPERANTIO

LABORISTA ESPERANTO LERNEJO (LEL)

Gastdomo k instruad-aparato por lab.-esp.-istoj. Sidloko k Sekretarejo: *Halifax Road 9, Denholme Gate* West Yorks. Anglio.

La gastdomo estas ĉiutage je dispono de ĉiuj anoj de laboristaj esperantistaj organizoj. Propagandcele oni povas escepte gastigi ne-Gek-dojn kun permeso de la Dom-Komitato. La lernej-aparato funkcias vespere, je la semajnfino kaj dum libertempoj. Instruado k praktikado en esp-o k sennaciismo estas la ĉefceloj de la kursoj. Interŝanĝo de diversnaciaj instruantoj k lekciantoj laŭ de Komitato eldonota plano. Instruado en Internacional-stenografio. Ĉiam estas postulata uzo de esp-o. Gazetoj, libroj ktp. estas ĉiam je dispono de l' vizitantoj. Ili ricevas senpagan instruon k praktikon k sekve ili nur pagas vivkoston dum tiea restado, kio ebligas al ĉiu lab. esp-isto ĉeesti.

La Lernejo troviĝas en *Denhom Get* (Denholme Gate) apud *Halifaks,* graflando Yorkŝir, en kampara loko, ĉirkaŭita de freŝaeraj montoj. Estas bona oportuno por studo de socia k politika vivo en tipa landparto de Anglio. Ĉefa apuda industrio estas lanŝpinado. Specialaj klarigoj pri vojoj ktp. estos sendataj kun kvitancoj. Flirtas la lab. esp. flago. Biciklogardejo senpaga. Somere oni ankaŭ en tendaro dormas. Estas loko por tendoj de vojaĝantoj Gek-doj. Tiuokaze oni nur pagas por manĝado.

Loĝado: La gastdomo funkcias ĉiutage; do oni povas tie restadi laŭ deziro. La kostoj estas por an(in)o de LEA aŭ SAT 4 anglaj ŝilingoj po tago. Speciala semajnfina (1½ tagoj) luo nur por anglaj Gek-doj estas 7 ŝilingoj anglaj. Vizitantoj devas kunporti proprajn broŝojn, mantukon kaj ĉiujn personajn necesaĵojn.

Kiel eble plej baldaŭ oni sendu loĝpagon samtempe kun letero indikante daton k tempdaŭron de restado. Prefere pagu per poŝtmandato registrita.

Adreso por ĉiuj leteroj estas la supre indikita.

Infansekcio. Pro tio, ke ĉe la gastdomo ĉiam troviĝas ses anglaj Gekdetoj (de 8 ĝis 17 j.) esp-aj, ni tre varme rekomendas nian gastdomon al ĉiuj, kiuj volas sennaciece instruigi sian infanon.

Konvinkitaj, ke ni devas de komenco tiele instrui infanojn niajn, ni speciale prizorgas tiun parton de nia laboro k Gek-doj ne timu pri la morala k fizika kulturo de ĉe ni restadantaj gejunuloj.

Domkomitato.

La sama ejo estas ankaŭ klubo de la Bingle- k Halifaks (Bingley k Halifax) BLEA-grupoj. Oni povas ĉiam renkonti esp. Gek-dojn.

---

eble. Kantante ni atingis Pegaŭ; super ni estis bela k klara stelĉielo. Rapide la vagonaro alproksimiĝis al nia hejmurbo Leipzig, kien ni lace alvenis. Volonte mi memoras ĉi tiun ekskurson.

Lab. esp. junularo, Leipzig (2055).

PRI SKRIBADO DE PROPRAJ NOMOJ

Mi ne povas konsenti kun la rimarkoj de la redaktoroj. *Unu* reformo de mi postulita estas, ke oni *ĉiam* emfazu la akcenton, aŭ per superstreko aŭ — k eble pli bone — per grasa tipo. Sen signo ĉiu esp. vorto devas havi la akcenton sur la antaŭlasta silabo. Sed oni ne rajtas[1] esp-igi la elparolon de la propraj nomoj. *Alia* reformo estas, ke oni *ĉiam* uzu la nacian ortografion kun la esp. ortografio en krampoj. La esp. literoj ne povas esprimi ĉiujn sonojn: k ofte la esp. ortografio tial estas tre malkontentiga k nur la kiel eble plej bona helpilo por la esp. leganto. La nomo *Dubreuil* estas tre bona ekzemplo. La esp. ortografio: "Dübreŭj" estas tre malkontentiga, ĉar *ü* tute ne estas esp. litero, kaj la esp. elparolo de eŭ ne estas la sama kiel la franca. Nu, *"Dübreŭj"* eble estas la kiel eble plej bona esp. skribmaniero. Sed ĝi ne devas *anstataŭi* la nacian ortografion, nur *klarigi* la elparolon. Zamenhof ŝanĝis la ortografion de sia *propra* nomo k deziris, ke aliaj faru la saman. Tio estas tute alia afero ol anstataŭi nacian ortografion de la nomoj de *aliaj* personoj.

Mi persone volonte skribus mian nomon: Lojnbak, ĉar mia nomo povas esti skribata per esp. literoj. Kaj tiuokaze ankaŭ la akcento estas prava. Zamenhof ne ŝanĝis la elparolon de sia nomo laŭ esp. regulo. Li ne nomis sin Zamēnhof. Ke la nacia ortografio nur *unufoje* estas skribita en artikolo k poste anstataŭita per esp. ortografio, ne sufiĉas. Aŭ Voltaire (Voltēr) ĉiufoje aŭ Voltaire (Voltēr) unufoje k poste Voltaire. Kaj se nur unufoje, almenaŭ unufoje en *ĉiu numero* de "S-ulo", k ne nur en la komenco de artikolserio kiel "Standards". Zamenhof ankaŭ admonas, ke oni ne tro kripligu k nerekonebligu la nomojn. Laŭ mia opinio ekzemple "Dübreŭj" estas trokripligo. Sed estus tre interesa aŭdi la opiniojn de aliaj K-doj pri ĉi tiu temo. Mi proponas diskutadon en nia ĵurnalo pri la demando, kiu ŝajnas al mi tre grava.

J. H. Lojnbak (15 076).

[1] *Red. Rimarkigo* Ni ne scias, en kiu kodo troviĝas la koncerna malpermeso. Kiam iu policisto el Esperantio minacos min je enkarcerigo, tiam eble ni ekkonscios pri nia nerajteco. Oni jam nemalofte aŭdas, ke esp-o estas pli malfacile lernebla lingvo ol kutimas emfazi ĝiaj propagandistoj. Se oni devas plie ellerni la ĝustan akcentmanieron pri milionoj da propraj nomoj, nia lingvo fariĝos ia teruraĵo. Ni opinias, ke oni povas sen ia atentinda domaĝo *esperantigi* la elparolon de propraj nomoj. Ne gravas ĉu ne franclingvano akcentas la unuan silabon de Volter anstataŭ la lastan. Franco komprenos. Sed li tute ne komprenos, se nefranclingvano elparolas esperante la vorton *Voltaire* (Vol-ta-i-re). Ĉu do ni devas fari fetiĉon el la nacia ortografio de propraj nomoj? Kio gravas, laŭ ni, estas eviti jenon: SAT-anoj, kiuj interkorespondadis dum kelkaj jaroj, renkontiĝas ĉe Kongreso k ne scias al kiu ili, parolas, kiam la korespondanto eldiras sian nomon; aŭ prezidanto de Kongreso sciigas, ke K-do Z havas la parolrajton k la koncerna K-do ne povas diveni, ke temas pri li, tial ke la prezidanto ne ĝuste, laŭ la nacia maniero, elparolis la nomon ... Praktike la nacia ortografio estas necesa nur por meti adresojn sur kovertojn de leteroj.

Sed, sendube ni ne konvinkos K-don J. H. L. k ŝekve se la plimulto el niaj legantoj malaprobus la "kripligon" de propraj nomoj, ni volonte rezignus la principon, kiun pli malpli sukcese ni obeis ĝis nun

---

SPERTOJ EN KORESPONDADO

Ĉu nur sovetianoj korespondas?

Laŭ fakto jes. Mi anoncis en "S-ulo" por korespondado kun gekursanoj el Berlino. La sukceso estis, ke ni ricevis 25 PK k let. el Sovetio k nur 5 PK el aliaj landoj; nome 2 el Svedio, 2 el Anglio k 1 el Aŭstrio. Kompreneble ni varmkore akceptis la rusan korespondadon, despli ke inter la leteroj kelkaj estis skribitaj de grupoj k fabrikoj.

La korespondado estis nia unua provo praktika k tre seriozigis nin por nova lernado k aplikado de esp-o. Saman efikon ni devas estigi en la cerboj de novaj gelernantoj. La unua korespondado en la kurso komenciĝas. Ho, kio alvenis? Entuziasme ni trastudas la leterojn k kartojn alvenintajn el tiu lando, pri kiu ni legas k aŭdas plej multon, sed malofte la veron. Nun ĉiu mem povas interrilati kun homoj el tiu lando. La korespondado do komencu! Celo! Preparo de vera Internacio, eĉ Sennacio, fundamente sur amasa praktiko. Sed ĉu Germanio k Sovetio estas Internacio? Kie vi restis, geesp-istoj el aliaj landoj?

Gustl Maier (3257), Berlino.

Erotikema esperantisto

Iu K-dino el Moskvo presigis anoncon en "S-ulo" pri sia deziro korespondadi kun eksterlandaj Gek-doj. Iutage ŝi ricevas leteron de iu germana esp-isto el Hainewalde. En tiu letero la esp-isto petas ŝin akcepti lian proponon pri korespondado k interŝanĝo, k interalie li skribas jenon: *"Mi sendos pro stampitaj poŝtmark. — kartojn il., malnovajn papermonojn, gazetojn, kartojn de nudaj belulinoj k erotikajn fotografaĵojn . . ."*

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

Nu, kion vi diros, karaj Gek-doj? Ĉu la esp-isto estas prava proponante *al junulino* kartojn de nudaj belulinoj k erotikajn fotografaĵojn?

Eŭgeno Blinov, Moskvo.

Pri la interesa statistiko de K-do Epifanoviĉ

En n-o 277 K-do P. Epifanoviĉ fanfaronis pri liaj multnombraj korespondaĵoj ricevitaj laŭ liaj anoncoj. La statistiko estis tre interesa sed pli interese estas scii, ĉu li ankaŭ respondis al la sendintoj, ĉar kiel mi scias, li eĉ al duono el ili ne respondis. Mi mem sendis al li du il. PK k ne ricevis eĉ unu respondon. K-doj, kiuj ne povas respondi, ne anoncu sin! Prefere ili korespondu laŭ anoncoj de aliaj K-doj. Tiel ili evitos malĝentilon.

L. Bornŝtajn, Lodz.

Pri sovetiaj korespond-anoncoj

Multaj Gek-doj en okcidenta Eŭropo k aliaj kontinentoj deziras korespondadi kun Sovetio responde al multnombraj anoncoj de sovetiaj esp-istoj en "S-ulo". Tamen necesas pliprecizigi adresojn en tiuj anoncoj per indiko de respubliko aŭ lando, kie loĝas K-doj. Se iu ekz. volas korespondi kun K-do en Uzbekio, li devas trovi en la anoncoj tiun indikon, por ne erari; ĉar multaj sovetiaj urboj k urbetoj mankas sur landkartoj. Mi proponas tial aldonon en fako "Korespondado" de tiuj indikoj per kreo de subrubrikoj jenaj: Rusio, Ukrainio, Blankrusio, Kaŭkazio (Kartvelio, Armenio, Azerbajĝano), Uzbekio, Turkmenio, Taĝikio.

Sergo Vasjura, Priluki (Ukrainio).

RADIO-ĤARKOV

Jam tri monatojn funkcias *ĉiutaga* esp. disaŭdigo de l' Ĥarkova stacio, unika disaŭdigo tiom ofta. Kvankam centoj da K-doj aŭskultas nian stacion, respondis al ni nur kelkaj K-doj. Tial la estraro intencas aranĝi nur *semajnan* esp. disaŭdigon. Ĉiu lab. esp-isto malebligu la malprogreson de tiu grava peresp-a afero. Sciigu letere, 1. ĉu vin interesas k utilas al vi esp. disaŭdigoj pri Sov. Ukrainio, 2. ĉu vi opinias necesa, ke plue restu ĉiutagaj esp. disaŭdigoj, 3. kiuj temoj vin precipe interesas, 4. al kiuj prisov. demandoj vi dez. ricevi resp., 5. ĉu la nuna horo de disaŭdigo (22 h. 10 laŭ MET) estas oportuna por vi; se ne, kia tempo? Adresu al: *Radio-Centro* (Red.), *Ĥarkov,* USSR. (Oni povas skribi senafranke). Esp. Ĥarkov.

Korektoj. — Bonvolu korekti en n-o 278, pĝ. 212, 2-a kolono, lin. 17 de malsupre: devas esti — "(pĝ. 76) sido (anst. sidloko)". La "Rimarkigo", pĝ. 205 malsupre, devas esti subskribita: *Bartelmes.* Pĝ. 202, 3-a kol., lin. 22 de malsupre — legu: "*ia*" (anst. "la").

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

FRANCIO. Parizo. Ĉe hungarlingvaj laboristoj funkcias kurso; la hungarlingva gazeto "Uj Harcos" (Nova batalanto) enpresis longan priesp. artikolon instigantan al lernado. — *SVEDIO. Stokholmo.* La ĉi tiea lab. esp. klubo havis kelkajn el siaj membroj inter la delegitaro al Junulara Tago en Vieno (lastjare). El la 350 junaj socialdem. vojaĝintaj al Vieno, pli ol 100 parolis esp-on. La 4. okt. 29 estis inaŭgurata nova ejo de la klubo, kiu havas nun 75 membrojn; la kunvenojn ordinare vizitas 40—60 pers. *Kiruna.* Kurso por komencantoj kun 38, por progresintoj kun 22 p. *Gravarne.* Fondiĝis lab. esp. klubo.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Listo de vortelementoj por la kandidatoj de la esp. ekzamenoj de la Ekz.-Instituto de Estonio, Tallinn, Postkast 6. 8-paĝa folio. Form. 11×18 cm. Prezo afrankite: 2 ekz. 1 resp. kuponon.

Serio da esp. vort-elementoj ordigitaj laŭ kategorioj k alfabete.

E. Sazonova, Mallongaj informoj pri Esperanto. Eld. CK SEU, Moskvo, 1930. Form. 10×14 cm. 32 pĝ. Prezo: 8 kop.

Ruslingva varb-broŝureto kun sciigoj pri progesoj de la esp. movado, SEU k SAT.

Memorlibreto por SEU-anoj. Eld. CK SEU, Moskvo, 1930. Form. 11×14 cm. 40 pĝ. Ruslingva. Senpaga por SEU-membroj.

Enhavas organizajn adresojn k informojn, kotiz- k abontarifojn, librokatalogeton ktp.

Internacia Teatraĵetaro. Diverslandaj aŭtoroj. Originaloj. Eld.: Belga Esp.-Instituto, 11, Kleine Hondstraat, Antverpeno, Belgio. Form. 11×16 cm. 48 pĝ. Prezo: 1.— mk. g.

Ses teatraĵetoj — kelkaj unu-, aliaj du-scenaj — plejparte tre banalaj, pri am-, bal- k edziĝ-aferoj, rusiaj eks-guvernistinoj, diamant-pendaĵoj k. a. burĝ-mondaj karakterizoj. Laŭ lingva k presa vidpunkto la libreto estas senriproĉa.

A. P. Ĉeĥov, Mia dialogo kun poŝtestro. Biblioteko de soveta PTT-isto. Eld. C. O. E. L. Moskvo, 1929. Kun antaŭparolo de N. Modenov. Havebla ĉe CK SEU, Spiridonovka 15, Moskvo Form. 10,5×15 cm. 24 pĝ. Prezo: 12 kop. (0.25 mk. g.).

Estas satiraĵo pri la burokratismo ĉe caraj poŝtoficejoj. La dialogo aperas kun paralela teksto en rusa lingvo. Ĝi ampleksas nete nur 6 malgrandajn prespaĝojn, la antaŭparolo 4! Tiaj proporcioj efikas ne bone.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Krasni Til. Ivanovo-Vozn., jan., Pri Hung. (268), pri Rum. (271); *La Solidarité,* Nice, 23. 11. 29, parolfilmo k esp. (259); *La Flamme,* St. Etienne, 2. 11., El Jap. (261), El Britio (260), parolf. k esp. (259), 2. 1., El Usono (263); *Le Drapeau Rouge,* Bruselo, 6. 8. 29, El Polio (246); *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 30. 10., El Britio (260), 8. 1., El Usono (263); *Le Travail,* Oudja, 5. 1., ekspluatado en Italio (269); *L' Action Laïque,* St. Etienne, jan., El Usono (263).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

ITF-Bulteno, Amsterd., jan.; *Uj Elöre,* Novjorko, 9. 12.; *Travail,* Lyon, 25. 1.; *L'Eclaireur,* Nice, 19. 1.; *El Socialista,* Madrid, 22. 1.; *Signalen,* Stokh., 23. 1.; *L'Internationale de l'Enseignement,* Paris, okt., dec.; *Le Midi Socialiste,* Toulouse, 13. 12.; *Le Cri Populaire,* Bordeaux, 15. 12.; *Le Populaire du Centre,* Limoges, 4. 1.; *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 8. 1., 21. 1.; *La Flamme,* St. Etienne, 12. 10., 14. 12.; *L'Emancipateur,* Bourges, 27. 10.; *Le Travailleur du Sud-ouest,* Limoges, 19. 10.

Peresper. materialon enpresis:

Le Travailleur Alpin, Grenoble, 18. 1.; *Le Bâtiment Parisien,* Paris, jan.

"Nur Volu" de Izgur aperis hungarlingve (trad. Batta) en almanako de l' gazeto *Uj Elöre,* Novjorko, por la jaro 1930.

NIA POŜTO

7520. — Via artikolo estas bone tradukita k ŝajnas al mi pres*inda*, tamen ĝi estas nepresebla en "S-ulo". Ĉu do vi mem ne komprenas la kialon? — Sendube vi intertempe ricevis la Jarlibron: ĝi ja estas nun dissendita al ĉiuj. *E. L.*

15 157. — "Same" sufiĉas anst. "same tiel" (samtiel), se oni ne volas speciale akcenti. Sed "la" antaŭ tiu konjunkcie uzita formo estas malkorekta.

Toporov, Samaro. — Ni transsendis al la sportpaĝa red.

12 868. — "Danko" ne povas aperi senpage. La vivpriskribo povos aperi nur laŭ sia vico. La "S-ulo"-n-on ni transsendis.

13 794. — Ni uzos viajn anekdotojn en "L. L.". *Red.*

13 155. — Via propono estas teknike ne ebla. — Cetere ĉiu akurata abonanto mem notas la abondaŭron.

7151. — Prefere sendu la tutan gaz. al la Red. en Paris. Se ne eblas, tiam sufiĉas eltranĉaĵo.

15 386. — Ni ne havas tempon por privata koresp-ado.

1125. — "Monoj estas pagitaj". Temas pri via anonco. Kiom da mono vi pagis? Kian grandon ĝi havu? Jen la ĉefa afero. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Anton Dorn, jun. (17 j.), *Kalsdorf, Nr. 142 b. Gr. Stuck,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI. Resp. garantiata.

BELGIO

Adr. de K-do Viktoro Kaulich estas nun ĉe K-do: Van Gerfsom Alfred, Rue Gustave Defnet 72, *St. Gilles-Bruxelles.* Korektu en Jarlibro!

BULGARIO

K-do T. N. Ĥristovski, *Radotina,* petas siajn sovetiajn Gek-dojn skribi al li per alil. perantoj; pro la cenzuro nur 1 resp. ricevita.

FRANCIO

K-do J. Cavaille, 2 Chemin des Sablonniers, *Lyon 3,* kun seriozuloj ĉl. pri div. temoj, L, PM, il. ĵurn.

GERMANIO

— Juna esperantano interŝ. PI, kĉl. Adr.: K-do Willi Stier, Krumme Str. 3, *Frankfurt — O.*

— Por ekkoni la mondon mi petas koresp. PI. Resp. garantiata. Adr.: K-do Konrad Haupt, Landgerichtstr. 30, *Wunsiedel/Bay.*

K-do Franz Heck, Rödelheimer Landstr. 113, ptr., *Frankfurt-Rödelh.,* serĉas serioz. koresp-antojn en Francio, Bulgario, Rumanio, Hispanio, Japanio k Ĉinio pri bredado de silkraŭpoj.

SOVETIO

— Grupo de gelab-istoj de Bramsa fabriko koresp. kun gelab-istoj ĉl. pri div. temoj, kolektive k individue. Adr.: *Jaroslavl,* p. o. Djadkovo, Tormaznoj zavod al K-do J. N. Kartaŝovu.

K-do Mikaelo Leŝĉenko, Ŝĉiglica 20, kv. 19, *Odessa,* pri ĉ. temoj kĉl.

— 20 K-doj de Esp. grupo ĉe klubo "Lenin" koresp. kĉl, pri ĉ. temoj Resp. garantiata. Adr.: *Odessa,* Mizikeviĉa i Gospitalana, Klub Lenina Esp. Grupo, G. Akselrod.

— 15 gelernantoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI, bfl. Skribu multnombre! Certe resp. Adr.: O. Kazina, ul. Zencova 204, *Ufa.*

K-dino Kolpakova (18 j.), Ogorodĥaja 10, kv. 3, *Moskvo-14,* pri ĉ. temoj, PI, fotoj.

K-do V. Dubkov, Penzenskaja 48, *Stalingrad,* interŝ. fotojn. Havas gr. kolekton de fotolaboraĵoj.

K-dino Nina Suradeva, Bakuninskaja 8, kv. 5, *Moskvo-5,* pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-dino Lena Nikolaeva, Kalancevskaja 4, kv. 4, *Moskvo,* pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-dino Anjo Strelcova, Uljanovskaja 29, kv. 19, *Moskvo-4,* kĉl, PI, bfl. Resp. garantiata.

K-dino Klaŭdino Maĥova, Bol. Poĉtovaja ul. 45, kv. 2, *Moskvo-5,* pri ĉ. temoj, PI, gaz. ĵurn.

— Esp. rondeto de tramistoj interŝ. fotojn, gaz., esp-aĵojn. Resp. garantiata. Adr.: Kruĵok Esperanto, Klubo de Buĥarin, Taganskaja 58, *Moskvo-4.*

Adresŝanĝo. — K-do St. Sostavkin transveturis el Zavitaja al *Suraĵevko,* Zejskij distr., Torgovaja str. d. Jaroslavcev.

K-do Georg Stetjuha, Sovetskaja 24, *Novoĉerkassk,* pri politikaj k teknikaj temoj, kĉl. Resp. certe.

— Tramistoj, akvokondukistoj fajrobrigadistoj, ŝarĝlaboristoj k ŝoforoj koresp. kun samprofesianoj ĉl. Adr.: *Sebastopol,* ul. K. Marksa 24 al Klub Komunalnikov.

K-do Aleksandro Pankov, (19 j.), Znamenskaja 7, kv. 1, *Ĥarkov,* pri ĉ. temoj kun prol. junularo k junkomunistoj ĉl.

K-dino Ksenio Svedomskaja, Nijne-Donskaja 16/4, kv. 5, *Smolensk,* serioze interŝ. PI, PM laŭ katalogo Ivert.

K-do Alekseo Moroz, ul. Kaŝena 21, kv. 1, *Smolensk,* kĉl, L, PK, PI. Resp. garantiata.

K-do V. Kurzanov, Nikitinskaja 109, kv. 4, *Samara,* pri ĉ. temoj, kĉl, interŝ. fotojn. Resp. garantiata.

K-do Paŭlo Simonov, Ĉepaevskaja ul. 169, kv. 5, *Samara,* kĉl, pri div. temoj.

K-dino Galino Makuŝkina (21 j.), Krasnoarmejskaja ul. 82, kv. 2, *Samara,* kĉl, L, PK, PI.

— Esp. grupo de 21-a laborlernejo (850 geknaboj) koresp. pri ĉ. temoj kun geinfanoj ĉl, L, PK, PI, gaz., lernlaboroj ktp. Resp. garant. Adr.: 21-a Trudŝkola, Pl. Feuerbach, *Ĥarkov.*

— Koresp. kĉl, pri lernejaj temoj, PK, gaz., ĵurn. la lernantaro de Ĉistjunka Volodarska ŝkola, *Barnaul,* Siberio.

— 19 jara laboristo koresp. kĉl, pri div. temoj (pref. ekstereŭropaj). Resp. garantiata. Adr.: K-do E. Pimenov, Kurajevskaja 25/7, *Penza.*

K-do E. Temnikov (laboristo), DVK Vokzalnaja d. Gornomĥoza, *Suraĵevna,* Zejskogo okr., kĉl, pri lab. kondiĉoj, precipe kun komencantoj.

Adresŝanĝo. — K-do Paŭlo Timofeev, Pr. K. Libkneĥt 84, kv. 6, *Leningrad,* (antaŭe en Tiflis).

K-do E. Eĵov, ul. Dzerĵinskogo 8, kv. 17, *Leningrad,* kun radioamatoroj ĉl., interŝ. radio-gazetojn.

K-do Petro Poliŝĉuk, *Berezan,* Kievsk. okr., Pivnoj sklad Piŝĉetresta, kĉl. Resp. garantiata.

K-do N. Peretjatko (junkomunisto). Primorskaja 28/1, *Odessa,* kun junuloj ĉl, PK, PI. Resp. garantiata.

K-do N. Sevastjanov, Konnaja 12, *Odessa,* PK, gaz., fotojn. Resp. gar.

SVEDIO

K-do Gunnar Pettersson, Bruket, *Strömnäs Bruk,* kĉl, L, PK, PI.

25 gelernantoj

dez. koresp. kĉl. per PI kaj per leteroj. Ili ankaŭ estas pretaj interŝangi ĵurnalojn, gazetojn, fotojn, poŝtmarkojn ktp.

Gekamaradoj el ĉiuj landoj skribu multnombre!

Skribu al jenaj Gek-doj: Werner Schubert, Lindenstr. 9, Martha Ille, Peniger Str. 23, Hans Arnold, Weststr. 37, *Limbach i. Sa.,* Germanio.

Atentu! Gek-doj el la tuta mondo de la 3-a Internacio!

Ni sciigas vin, ke ni sukcesis akceli la esp. movadon inter la hungarlingvaj laboristoj laborantaj en Parizo. Esp. kurso malfermiĝis, krom tio la loka hungarl. klasbatala lab. gazeto "Uj harcos" (Nova batalanto) enpresis ampleksan priesp. artik., samtempe proponis al siaj leg. lerni esp-on. Do ni petas, helpu al ni sendante amase salut- k aprob-let., PK ktp. de viaj organizoj k individue, al la Administracio de "Uj harcos", 33, rue de la Grange-aux-Belles, *Paris 10e* (Francio). Kun danko k saluto nome de kelkaj SAT-anoj (11 135, 14 604).

Atentu, Sovetiaj Gekamaradoj!

Komence de la mondmilito estis malliberigita kiel aŭstria soldato en Rusio: *Miczka Jozef* (legu Miĉka) el Stonava. Kiu povus liveri iajn informojn pri nuna lia restado, estu tiel bonvola alsendi laŭ adreso al: Miczka Jozef, *Stonava 529,* Silezio, Ĉeĥoslovakio. Ĉiujn klopodojn mi rekompencos!

Geinstruistoj, atentu!

Mi bezonas sciigojn pri nova didaktika materialo, uzata en diverslandaj lernejoj (precipe unuagradaj). Gekdoj, kiuj eksperimentas, helpu koncentri ĉiujn fortojn kaj ĉiajn spertojn! Skribu multnombre al sekretario de Nederlanda komitato por radikala instru-reformado: K-do Alb. J. Groenestein, "La Nova Lernejo", *Huizen* (Nederlando); SAT-ano 10 451.

Ĉelo de esperantistoj

en Nova Klubo de Ligil-Domo en Moskvo deziras korespondi kĉl. pri diversaj temoj. Respondo estas garantiata. Adr.: MOSKVO, Tverskaja 17, klubo, ĉelo de esperantistoj.

ENHAVO:

	pago
Pri kaŭzeco	225
Kio okazas en Kubo?	226—227
Kulturtaskoj	226—227
Mia tago	227
En kunesto kun grandaj spiritoj	227
Esperanto-Servo	228
Junulara Paĝo	229
Tra Esperantio	230—231
Korespondado, Anoncoj	232